# Komerca politiko en la agrikulturo celas stimuli produktadon kaj forigi obstaklojn




**Meisi Bolaños**

Havano, a?g 3 (RHK) La efektivigo de la Orda Tasko en la ekonomio de la insulo kunportis la transformon de la reala kosto de produktado kaj, sekve, de prezoj.

Jen unu el la pluraj konsekvencoj, kiujn la kuba kamparano frontas hodia?, kaj kiuj aldoni?as al tiuj ka?zitaj de la intensigita ekonomia kaj komerca kaj financa blokado kontra? nia lando.

En ?i tiu kunteksto, Meisi Bolaños Weiss, estro de la Ministerio pri Financoj kaj Prezoj (MFP), klarigis en gazetara konferenco, ?i-lunde, kial oni decidis nuligi la maksimumajn prezojn por la kolekto de agrikulturaj produktoj destinitaj al la socia konsumo, medicinaj dietoj kaj Familia Prizorga Sistemo, la? Rezolucio 320, eldonita de la Ministerio pri Financoj kaj Prezoj, kaj publikigita en la Oficiala Gazeto n-ro 68 Eksterordinara, 30 julio 2021.

La ministrino elstarigis esencan elementon de la jura teksto, kaj tio estas, ke la maniero rekoni, kion vere kostas al la produktanto produkti la viandon a? legomojn, estas permesi pli bonajn kondi?ojn por la interkonsento de prezoj kaj kontraktado, tiel en socia konsumo kiel en la  vendo en la podetala merkato.

Fleksebleco, regulado kaj forigo de obstakloj en la agrikultura sektoro pelas la novan politikon de komercado de agrikulturaj produktoj en la lando, diris la ministro pri agrikulturo, Ydael Pérez Brito.

Agrikulturo travivas stre?ajn momentojn pro la blokado, kiu senigas la sektoron de enspezoj kaj rimedoj necesaj por atingi altajn produktadojn, la administranto diris al la gazetaro, kaj atentigis, ke la pandemio anka? devigas fari aliajn decidojn pri agrikulturo.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/265941-komerca-politiko-en-la-agrikulturo-celas-stimuli-produktadon-kaj-forigi-obstaklojn

Radio Habana Cuba